

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 60, septembro-oktobro 2022



Universala Esperanto-Asocio

Universala Kongreso de Esperanto renkontiĝis en Montrealo, publikigis deklaron pri indiĝenaj lingvoj



La Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032) estis la ĉefa temo de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto. Reprezentantoj de kvindeko da landoj ĉeestis la aranĝon, kiu finiĝis per Deklaro transdonita al Unesco kaj Unuiĝintaj Nacioj, kun jena teksto:

La 746 partoprenantoj de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Montrealo, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022, traktis la kadran temon "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj." Per teritoria agnosko en la malferma ceremonio de la Kongreso, ni esprimis nian profundan dankon al la diversaj indiĝenaj nacioj, unuavice la ganjenka popolo (Kanien'kehá:ka, Mohawk), kiuj neniam cedis siajn rajtojn je tiu teritorio, kie ni kunvenis.

Per prelegoj, filmoj, diskutrondoj, kaj ankaŭ lingvokurso pri la aniŝinabeka, ni lernis pri la granda diverseco de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj en Nord-Ameriko kaj tutmonde. Ni konstatis, ke indiĝenaj popoloj ludas gravan rolon en la konservado de naturaj resursoj kaj biologia diverseco, kaj estas portantoj de fundamentaj scioj por nia daŭripova ekzisto sur la Tero. Ni krome aŭdis kiel, malgraŭ multaj baroj kaj atakoj al iliaj rajtoj, tiuj popoloj organiziĝas por daŭre plenumi siajn tradiciajn okupojn, konservi siajn kulturajn praktikojn kaj aserti siajn rajtojn je siaj teroj.

Honore al la komenco de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), nia Kongreso eldonis novan tradukon en Esperanto de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Inter la multaj rajtoj agnoskitaj en tiu dokumento, ni aparte atentigas pri Artikolo 13, laŭ kiu "Indiĝenaj popoloj rajtas revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, buŝajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj." Kiel movado por lingvaj rajtoj, ni esprimas nian fortan subtenon al tiuj principoj.

La parolantoj de Esperanto alte taksas la valoron de kultura kaj lingva diverseco kaj kunlaboras por realigi lingvan demokration en monda skalo. Konforme al tiuj celoj kaj al la informoj kaj ideoj pritrakitaj en ĉi tiu Kongreso, ni deklaras nian solidarecon kaj subtenon al indiĝenaj popoloj en ties streboj por memdetermino, paco, justeco, kaj interkompreniĝo.

La venontjara kongreso okazos en Torino, Italio, de 29 julio ĝis 5 aŭgusto 2023.

Duolingo vastigis siajn Esperanto-rimedojn

Ĉiujare proksimume 700.000 homoj lernas Esperanton per Duolingo, kiu proponas kursojn por parolantoj de la angla, hispana kaj portugala. Lastatempe aldoniĝis kurso por parolantoj de la franca.

<https://www.duolingo.com/course/eo/zh>

Lingvo kaj amikeco por paco

Temas pri feliĉa koincido, ke la Internacia Tago de Amikeco kaj la Tago de Esperanto okazas ene de kelkaj tagoj unu de la alia. UEA rimarkis tion per specialaj mesaĝoj, atentigante, ke "paroli la saman lingvon ne nepre alportas pacon, sed se oni ligas ĝin al amikeco, ĝi prezentas la plej bonan ŝancon por paco. Jen kial Esperanto-parolantoj uzas sian lingvon por antaŭenigi amikecon tutmonde".

Ni laboras (asertis UEA) por "mondo kie la popoloj libere konatiĝu kaj komunikiĝu sur neŭtrala fundamento". Pro tio, "grave estas, ke ni forte laboru por kultivi amikecon je tutmonda skalo – por engaĝi la problemojn kiujn la mondo frontas kaj kapti okazojn kiuj povas plibonigi la staton de la terglobo kaj ĉiuj ĝiaj enloĝantoj".

"Per lastatempa rezolucio, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj denove emfazis la gravecon de multlingvismo kaj honorado de la lingvoj de la mondo. Ne sufiĉas instrukcii al la mondo per la grandaj lingvoj: necesas aŭskulti la voĉojn eĉ de la plej malgrandaj. Jen rolo por Esperanto, kiel ligilo inter ĉiuj mondaj lingvoj".

La spirito de Esperanto en Unuiĝintaj Nacioj

En dialogo kun la tiama kandidato al prezidanteco de la venonta 77-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, S-ro Csaba Kőrösi, UEA prezentis demandon pri multlingvismo. Nia reprezentanto, prof. Francis M. Hult, memorigis, ke multlingvismo estas fundamenta valoro de UN kaj centra elemento por kunlaborado kaj solvado de problemoj. Lingvoj gravas por antaŭenigi solidarecon kaj unuiĝon, kaj pro tio oni devas progresigi multlingvismon en la ĉiutaga laboro de la Ĝenerala Asembleo kaj la tuta UN-komunumo. Kőrösi bonvenigis la vortojn de Hult kaj rakontis pri esperantista amiko kiu konstante diras al li pri la graveco de Esperanto por packonstruado kaj interkompreniĝo. Li invitis la esperantistojn helpi kaj konsili kiel la spirito de Esperanto pri rilatado inter malsamaj homoj, malsamaj komunumoj kaj malsamaj ideoj povas plibonigi la laboron de la Ĝenerala Asembleo.

Remeti CDE-4 survoje post KOVIM-19: La fundamenta rolo de multlingvismo en edukado

La Komitato de NROj pri Lingvoj, la Universala Esperanto-Asocio, kaj la Konstanta Misio de Hispanio ĉe UN, organizis apartan aranĝon dum la Altnivela Politika Forumo de UN.

Elstaraj fakuloj pri edukado diskutis kion praktike signifas multlingva perspektivo de CDE-4. Per empiriaj esploroj kaj dokumentitaj bonaj praktikoj, ili montris kiel lernejoj povas uzi multlingvismon, inkluzive gepatrajn lingvojn, mondajn lingvojn, naciajn kaj regionajn lingvojn, indiĝenajn lingvojn, kaj internaciajn lingvojn kiel Esperanto, por atingi inkluzivan kaj egalan edukadon kiu potencigas lernantojn kiel tutmondajn civitanojn, pretajn por partoprenado en la socia, ekonomia kaj politika vivo.

La impone multnombra ĉeestantaro aparte fokusigis sian atenton al la rolo de lingvoj en edukado kiel tio estis prezentita en la raporto de Unesko pri la Iniciato “Estontecoj de Edukado” – *Kune Reimagi Niajn Estontecojn*.

**Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
[1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.**